 Tiu birdido falis el sia nesto.  
 La kato saltas (de la planko) sur la tablon.  
 Ludante la kato saltas sur la tablo (li jam estas tie).  
 Hodiaŭ la vetero estas bela. Tial mi iros al la urbo.  
 Mi eniros en la parkon kaj promenos en ĝi.  
 Sed mi havas multe da laboro. Tial mi reiros hejmen.  
 Mi ofte legis pri Esperanto en gazeto.  
 Bone pripensu tiun aferon.  
 Venu priparoli ĝin iam ajn.  
 Diru kion ajn vi volas, mi ne konsentas.  
 Lampo lumas kaj fajro brulas en la forno.  
 Sidante sur komforta fotelo li legas interesan romanon.  
 Rakontu, Marko! Ne, mi ne havas sufiĉe da tempo.  
 Kiel oni faru tion? Ĉu vi povus helpi al mi?  
 Lasu min montri al vi. Rigardu! Oni faru tiel.  
 Kiel ĉarmaj estas tiuj katidoj!  
 Li jam estas tiel granda, kiel mi.  
 Ĉu vi ŝatas historion tiel multe, kiel geografion?  
 Jes, sed mi preferas matematikon... kaj esperanton!

*Combien d'œufs y a-t-il dans ce nid-ci ?  
 Regarde ! Cette jument est avec deux poulains.  
 La grenouille saute dans l'eau (elle y était déjà).  
 La grenouille (rano) saute (du bord) dans l'eau.  
 Que votre jardin est beau !  
 Mais pas aussi beau que celui de mes grands-parents.  
 Le temps est aussi beau cette semaine que la précédente  
 (pasinta) mais il pleuvra la semaine prochaine (venonta).  
 Parle-moi de ta famille et de tes amis.  
 Quoi que tu dises, j'irai. Réfléchis bien à cela.  
 Il arrive souvent n'importe quand.  
 Des grues (gruoj) volent au-dessus de (super) Périgueux.  
 Où vont-elles ? Vers le nord. C'est le printemps...  
 Comment ont-ils fait ça ? Comme ça, regarde...  
 Il est enseignant en histoire et géographie.  
 Laissez-moi raconter, s'il vous plaît.  
 Pourrais-je vous aider ?  
 Il lit son journal dans un fauteuil confortable.  
 Je suis fatigué, c'est pourquoi je préfère rentrer chez moi.*

*Le volitif (finale « u ») traduit notre impératif et notre subjonctif (ce dernier seulement en cas de volonté ou de nécessité) :*

- **helpu** min = *aidez-moi*
- mi deziras, ke vi **helpu** min = *je souhaite que vous m'aidiez*
- **donu** al mi ilon, por ke mi povu... = *donnez-moi un outil pour que je puisse...*
- *mais* : eblas, ke mi malfru**os** = *il est possible que je sois en retard (pas de volonté exprimée ici)*

*Le conditionnel (finale « us ») s'emploie, contrairement au français, dans les deux propositions de la phrase :*

- se mi est**us** riĉa, mi aĉet**us**... = *si j'étais riche, j'achèterais... (mot à mot : si je serais riche, j'achèterais...)*

## Esperanto

## Français

Mi deziras, ke vi iru al la vendejo (magazeno).  
 Aĉetu diversajn legomojn kiel brasikojn, terpomojn...  
 ... almenaŭ kvin, por ke mi faru bonegan supon.  
 Alportu viandon kaj fruktojn: pirojn, prunojn...  
 Sur la tablo mi preparis tablotukon, buŝtukojn...  
 Malvarmas kaj vi malsanas. Ne forgesu vian naztukon.  
 Ĉe la preĝejo, iru dekstren kaj ĉe la urbodomo maldekstren.  
 La vagonaro veturas tra la tunelo (= traveturas la tunelon).  
 La gastoj baldaŭ alvenos. Ĉu vi estas preta?  
 Rigardu tra la fenestro: ili jam ĉeestas.  
 Kelkaj estas en la mezo de (meze de) la ĝardeno.  
 La kuko estas preta. Kiom da personoj gastas?  
 Se mi estus riĉa, mi aĉetus aviadilon (flugmaŝinon).  
 Mi flugus super kampoj, arbaroj... same kiel birdo.  
 Sed mi ne havas sufiĉe da mono.  
 Estas multe da personoj ĉirkaŭ la tablo: ili estas unu kontraŭ la alia. Ĉu vi estas kun mi aŭ kontraŭ mi?  
 Tio estas alia afero... Ĉu vi bone komprenis min?

*Elle souhaite qu'il aille en ville pour faire des courses (butikumi). Il n'est pas sûr que cela soit possible.  
 Donne-moi les légumes que je t'ai demandés.  
 Voici les pommes de terre et le chou. Où est la viande ?  
 Je n'avais pas assez d'argent pour acheter de la viande.  
 Si tu partais plus tôt, tu pourrais acheter un gâteau, le même que la semaine dernière. Mais je ne suis pas prêt.  
 Comment étaient les pommes et les poires ? Pas très belles.  
 Tu pouvais en acheter au moins quelques-unes.  
 Les invités arriveront vers midi.  
 Il y a des fleurs au milieu de la table. Qui les a apportées ?  
 Une personne que je ne connais pas.  
 Les invités sont autour de la table. Ils sont nombreux.  
 Combien sont-ils ? Combien d'invités y a-t-il ?  
 Que fait-il ? Par la fenêtre, il regarde un avion.  
 Autour de la ville, il y a des champs et une forêt.  
 Sa main gauche n'est pas aussi habile (lerta) que sa droite.  
 La nappe est sur la chaise qui est contre le mur.  
 Ne parlez pas trop vite, afin que je vous comprenne.  
 Avez-vous bien compris ces diverses affaires ?  
 Je souhaite que vous vous portiez bien. A bientôt !*

- **...on.** = *suffixe indiquant une fraction*    **duono** = *moitié*    **triono** = *tiers*    **tri kvaronoj** = *trois quarts*
- **...obl.** = *suffixe multiplicatif*    **duobla** = *double*    **duoble tri estas ses** = *deux fois trois font six*
- **...op.** = *suffixe pour des groupes*    **duopo** = *duo*    **duope** = *par deux*    **kvarope** = *par quatre*
- **...ad.** = *suffixe pour action se prolongeant, se répétant...*    **parolo** = *parole*    **parolado** = *discours*

La préposition **po** s'utilise pour un partage ; on la place devant le nombre attribué à **chacun** des éléments.

- **mi disdonas al ili ludkartojn po 13** = *je leur distribue à chacun 13 cartes.*

## Esperanto

## Français

Mi faris duonon de mia laboro sed li faris du trionojn.  
 Ŝi duone fermis la okulojn.  
 Kiom estas la kvinono de tridek? Ses.  
 Kioma horo estas? La dek-unua kaj kvarono.  
 Ni alvenos tagmeze, post tri kvaronhoroj.  
 Kiom estas trioble kvar? Dek du.  
 Ili malsatas. Donu al ili biskvitojn po kvin.  
 La policistoj iras duope. Duopo estas paro.  
 Nun Kajto kantas duope.  
 Post longa irado en la naturo doloras min (al mi) la piedoj.  
 Tiu hundo ĝenas min per sia bojado.  
 La preĝejo havas du altajn turojn.  
 Sur unu el ili estas turhorloĝo.  
 Ĉu ĝi indikas la saman horon, kiel via brakhorloĝo? Jes.  
 Ĝiaj montriloj estas grandegaj.  
 Mia vekhorloĝo vekis min tro frue. Mi vekigis tro frue.  
 Kiom longa estas la tablo? Mi ne scias. Mezuru!  
 Kiomfoje vi provis? Mi jam provis tri fojojn.  
 Provu ankoraŭfoje (denove)! Almenaŭ unu fojon (unufoje).  
 La reĝo ĝojas, ke li faris agrablan ekskurson.  
 Ili haltis apud la rivero por kolekti florojn.  
 En la naturo oni povas observi plantojn, bestojn...  
 Animaloj estas bestoj kaj homoj.  
 Ni do estas animaloj.

*Les trois quarts des invités sont déjà arrivés.  
 J'ai à moitié réussi mon examen (sukcesi ekzamenon).  
 Kapriol' chante et danse en quatuor. (danser = danci)  
 Combien font six fois trois ? ...  
 Quel est le tiers de trente-six ? ...  
 Attends-moi ! J'aurai fini dans une demi-heure.  
 Je souhaite que tu te réveilles à six heures et demie.  
 Je pense que ton père se réveillera avant toi.  
 Combien de fois je t'ai demandé de te dépêcher (rapidi) !  
 Fais attention ! Tu dois mesurer avec précision (precize).  
 Il leur a donné une pomme à chacun.  
 Combien d'aiguilles a la montre de ton grand-père ? Trois.  
 Après leur agréable excursion, le roi dîne avec la reine, le prince et la princesse.  
 Cette traduction est vraiment longue. J'ai mal à la tête.  
 J'ai déjà essayé (essayer = provi) trois fois de traduire cette phrase ! Notre animateur est un vaurien !*

- ...aĵo = *suffixe indiquant une chose concrète*    manĝi = *manger*    manĝaĵo = *aliment (qqch à manger)*
- ...eco = *suffixe indiquant une qualité*    bela = *beau*    beleco = *beauté*
- ...ulo = *suffixe indiquant un individu*    juna = *jeune (adjectif)*    junulo = *un jeune (substantif)*
- pro = *à cause de (lien de cause à effet)*    mi ŝatas leonojn pro ilia beleco
- for = *loin*    for de la okuloj, for de la koro    foresti = *être absent*    foriri = *partir*

## Esperanto

## Français

Ŝi rigardas tra la fenestro sed vidas nenion.  
 Li ne aŭdas min ĉar aŭskultas muzikon per sia radioaparato.  
 Li parolas sed mi ne bone komprenas tion, kion li diras.  
 Ĉu vi bezonas kunporti manĝaĵon kaj trinkaĵon?  
 Ne diru stultaĵon! Vi ne plu estas infano.  
 Pro kio vi ploras? Mi ploras ĉar mi estas malfeliĉa.  
 Ŝi estas bela kaj saĝa = ŝi havas belecon kaj saĝecon.  
 Junulo kaj junulino renkontiĝis pro ekzameno.  
 Tiu stultulo (stulta viro) komprenas nenion.  
 Ĉu vi estas fraŭl(in)o? Ne, mi havas kunul(in)on.  
 Mi estas preskaŭ sola ĉar miaj geamikoj foriris, krom vi.  
 Ilia bebo estas suĉinfano: ĝi ankoraŭ suĉas.  
 Nia filo malsaniĝis: li malbone spiras.  
 Li nek manĝas nek trinkas kaj preskaŭ ĉiam dormas.  
 Kiam liaj gepatroj forpasis (mortis) li ankoraŭ estis juna.  
 La tempo pasis kaj li mem lernas: li fariĝis bona studento.  
 Edziĝinte li bone zorgis pri siaj (la propraj) infanoj.  
 Ĉu vi deziras viziti la infanĝardenon?  
 Preskaŭ ĉiuj denove ĉeestas.  
 Lastan semajnon multaj el ili forestis pro malsano.

*Ils regardent depuis leur fenêtre et aperçoivent leurs (propres) enfants.  
 Je l'appelle mais il ne m'entend pas.  
 Les riches n'écoutent pas ce que disent les pauvres.  
 Comprenez-vous ses paroles ?  
 Je suis malade car j'ai mangé trop de sucreries.  
 Les nouvelles sont-elles bonnes ?  
 Quelques-uns sont absents pour cause de maladie.  
 Partez, il désire rester seul.  
 J'apprécie non seulement la beauté, mais aussi la sagesse.  
 Respirez par le nez.  
 Je les aime tous, à part cet imbécile...  
 Il n'est ni grand ni beau.  
 Trois personnes s'occupent de dix-huit nourrissons dans cette crèche. Les bébés sont six par pièce.  
 Deux de mes fils se sont mariés cette année mais le troisième est toujours célibataire.  
 Ma fille s'est mariée l'année dernière.  
 Pierre et Anne se marieront l'année prochaine.  
 Boudiou ! Ce recueil d'exercices comporte environ quarante questions par page !*



- **...em.** = *suffixe indiquant un penchant, une tendance* laborema = *travailleur* ludema = *joueur*
- **...ebl.** = *indique une possibilité* manĝebla = *mangeable* eble = *peut-être*
- **re...** = *préfixe pour répéter (comme en français)* refari = *refaire* reveni = *revenir*
- **dis...** = *indique une dispersion* disdoni = *distribuer* distranĉi = *partager*
- **kvankam** = *bien que* **tamen** = *cependant* **kvankam** li estas riĉa, **tamen** li ne estas feliĉa

## Esperanto

## Français

Kvankam la suno brilas, tamen estas malvarme.  
 Silentu! Vi estas tro babilemaj.  
 Li ne havas sufiĉe da mono, kvankam li estas ŝparema.  
 Via historio ne estas kredebla. Vitro estas travidebla.  
 Unu el la ĉeestantoj disdonas la ludkartojn.  
 La leterportisto disportas leterojn kaj bildkartojn.  
 Li ankoraŭ ne redonis la monon, kiun mi pruntedonis (alpruntis) al li.  
 KREDU min! Mi emas pruntepreni (deprunti) de neniuj kaj preferas ŝpari monon antaŭ aĉeti.  
 Irante al magazeno, mi ekkonsciis (rimarkis), ke refoje mi forgesis mian monujon. Mi do revenis.  
 Ĉu vi ne forgesis sukerojn? Ne, ĝi estas en la korbo.  
 La homa korpo konsistas el tri ĉefaj partoj: la kapo, la trunko kaj la membroj (brakoj kaj kruroj).  
 La trunko konsistas el la brusto, la ventro kaj la dorso.  
 La piedoj de la simioj estas similaj al manoj, kun longaj fingroj. Ĝirafoj havas (posedas) tre longan kolon.  
 Ŝiaj haroj kaŝas grandan parton de ŝia frunto.  
 Lia barbo kovras liajn vangojn kaj mentonon.  
 La kuracisto volas vidi lian langon: « Malfermu la buŝon! »  
 Mi ne povas lin rekoni ĉar ne vidis lian vizaĝon.

*Bien qu'il soit sérieux et très habile (lerta), il n'a pourtant pas réussi à faire cela. Dommage ! (domaĝo = dommage)*  
*Mon voisin n'est pas loquace : le silence est habituellement sa seule réponse. Je l'ai tout de même fait parler.*  
*Bien qu'il soit très craintif, il a quand même pris la parole.*  
*Cette eau n'est pas potable. Ne la buvez pas !*  
*Ses parents se sont séparés (« sont devenus séparés »).*  
*On a séparé les combattants (batali = combattre).*  
*Ils ont bien vendu ce livre dans tout le pays.*  
*Ne lui prêtez pas d'argent ! Il n'est pas assez économe.*  
*J'ai acheté ma maison grâce à un emprunt.*  
*Les doigts de ce pianiste sont très longs.*  
*Son beau visage se dresse sur un long cou.*  
*Gifler (vangofrapo), c'est frapper une joue avec la main.*  
*J'ai mal au ventre. Ai-je trop mangé?*  
*Je pars demain, mais mon sac à dos n'est pas encore prêt.*  
*J'ai fini cet exercice bien qu'il soit long et difficile. Je peux être fier (fière) de moi !*

- **...ujo** = *suffixe indiquant un contenant*    monujo = *porte-monnaie*    supujo = *soupière*
- **...estro** = *indique un chef*    urbestro = *maire*    ŝipestro = *capitaine*    muzikestro = *chef d'orchestre*
- **bo...** = *préfixe pour la belle-famille*    bofrato = *beau-frère*    bogepatroj = *beaux-parents*
- **...anta** = *participe actif présent*    lernanta = *en train d'étudier (adjectif)*    lernanto = *étudiant (substantif)*
- **...ata** = *participe passif présent*    lernata = *étudié, appris*    La ĉapitro lernata tiun semajnon estas tre grava.

## Esperanto

## Français

Ies bofilo (la bofilo de iu) estas la edzo de ĝia filino.  
 Ana tre ŝatas siajn bogepatrojn. Ili loĝas en vilaĝo.  
 Mi demandis al la staciestro, ĉu la trajno jam foriris.  
 La estraro estas la aro (grupo) de la estroj.  
 Bonvolu meti la supujon sur la tablon, kaj ne forgesu la salujon. Atendu por alporti la sukerujon; ni bezonos ĝin nur kiam ni trinkos la kafon.  
 Abelo estas la insekto, kiu produktas mielon.  
 Parencoj estas samfamilianoj: gepatroj kaj gefiloj, gefratoj, geavoj kaj genepoj, geonkloj kaj genevoj, gekuzoj, boparencoj...  
 La gefianĉoj geedziĝos venontan semajnfino.  
 Vojaĝante, li renkontis junan vidvinon.  
 Instruisto ŝatas, kiam la gelernantoj serioze partoprenas la kurson.  
 Videble tiu ĉi kato ŝatas esti karesata.  
 Li alvenis, kiam ni estis manĝantaj. La manĝoĉambro kaj la kuirejo ne estis en ordo. Ni poste ordigis ilin.  
 Fiŝkaptisto estas kaptanta fiŝon.  
 Freŝa neĝo aperis sur la montoj sed baldaŭ malaperos pro la varmo. La ĉielo estas sennuba.  
 Noktiĝas. Jen aperas la luno kaj steloj.

*J'ai de la chance : ma belle-famille est très sympathique.  
 Le chef d'Etat et tout le gouvernement étaient présents.  
 J'ai oublié comment on appelle la maison des abeilles...  
 Ah ! Oui ! Une ruche.  
 Ce vieux couple a douze petits-enfants.  
 En lisant cette phrase, je m'aperçois (remarque) que j'ai commis une erreur : j'ai oublié l'accusatif.  
 Il s'est adressé aux participants de la manière suivante : ...  
 Les enfants ! Veuillez ranger votre chambre, s'il vous plaît !  
 Pierre est en train de lire un livre. Le livre qu'il lit est sur sa table. C'est parce qu'il est parti pêcher !  
 Je suis en train de cuire un gâteau. Le gâteau en train de cuire sent déjà très bon !  
 Attention ! Caresser ce chien est peut-être dangereux !  
 Que c'est bon le pain frais ! Tu as raison.  
 Le ciel est très beau au-dessus des montagnes.  
 La nuit, j'adore observer la lune et les étoiles. Le cours se termine ; tu vas pouvoir y aller. A bientôt !*

## Les participes

- **Avant l'action :** ...onta = participe **actif futur**      ...ota = participe **passif futur**
- **Pendant l'action :** ...anta = participe **actif présent**      ...ata = participe **passif présent**
- **Après l'action :** ...inta = participe **actif passé**      ...ita = participe **passif passé**
- Ces participes sont employés surtout avec le verbe être, à tous les temps : esti, estis, estas, estos, estu, estus.
- Ils peuvent être à l'origine de substantifs, d'adverbes : lernantoj (élèves), neatendite (de manière inattendue)...

## Esperanto

## Français

Bonvolu silenti, mi estas aŭskultanta la prelegon.  
 Ĝeninte min, li eĉ ne pardonpetis.  
 Mi iom timas ĉar estas trapasonta ekzamenon.  
 Ĉu la trapasota ekzameno estas malfacila?  
 Mi esperas, ke ne!  
 Ĵurnalisto skribis artikolon pri tiu pasintjara okazintaĵo.  
 Kiam li estas trinkinta kafon, li estas iom nervoza.  
 Ne uzu naztukon jam uzitan...  
 Li vomis la trinkitan vinon kaj la manĝitan kukon...  
 Se mi estus sciinta, mi ne estus veninta!  
 Ĉi-matene la ĉielo estis hela (luma) kaj blua, sed nun griziĝas. Kaj tiuj nuboj estas malhelaj; ĉu pluvos?  
 Estus domaĝe se pluvos ĉar ferioj baldaŭ komenciĝos.  
 Ne estu egoista! La kampoj bezonas akvon.  
 Kiun landon vi dezirus viziti dum ferioj?  
 Sub la branĉoj de tiu ĉi arbo estas agrabla ombro.  
 Ĉu vi preferas fragojn aŭ ĉerizojn? Precipe ĉerizojn.  
 Mi ŝategas serĉi fungojn en (la) arbaroj kaj (la) herbejoj.  
 Promenante sur la kamparo, nia vojo trapasis belegan rivereton, kies fluanta akvo estis tiel klara (travidebla), ke oni vidis ŝtonojn sur la fundo. Ĉu ili kaŝis fiŝojn?  
 Leginte tion mi pli bone komprenas, kiel uzi la participojn.

*Avant de répondre, réfléchissez bien !  
 Il regarde avec envie (avide) le gâteau à manger.  
 J'ai besoin de me reposer car je viens de passer un examen.  
 Penses-tu avoir réussi l'examen (que tu viens de passer) ?  
 J'espère, mais ne suis pas certain(e).  
 J'aime la viande, mais seulement bien (longuement) cuite.  
 Après avoir cherché des champignons, j'aime beaucoup les cuire et les manger... Accepterais-tu de m'accompagner ?  
 L'année prochaine, je passerai mes vacances en Italie.  
 Demain, ayez mangé suffisamment tôt avant le départ.  
 Je regrette. Si j'avais su que tu n'avais pas mangé, je t'aurais préparé quelque chose.  
 En été, le ciel est souvent bleu, clair et lumineux, mais il est gris aujourd'hui. Il pleuvra peut-être demain. En attendant, promenons-nous jusqu'à la rivière ! Son eau est très claire et, au fond, les pierres peuvent cacher de beaux poissons.  
 Venez sous les branches de ce bel arbre. Il y a de l'ombre.  
 Où passerez-vous le mois de juillet ? Chez mes grands-parents.*

- **...inda** = *qui mérite de...*      leginda = *qui mérite d'être lu*      vidinda = *qui mérite d'être vu*
- **...um.** = *le suffixe passe-partout, ou joker ; établit un rapport, faute de mieux, si aucun autre suffixe n'est plus approprié :*      kolo = *cou*      kolumo = *col de chemise*      akvo = *eau*      akvumi = *arroser*
- **...njo** = *diminutif féminin*      patrino = *mère*      panjo = *maman*      Ana = *Anne*      Anjo = *Annette...*
- **...ĉjo** = *diminutif masculin*      patro = *père*      paĉjo = *papa*      Petro = *Pierre*      Peĉjo = *Pierrot...*
- **anstataŭ** = *au lieu de*      **apenaŭ** = *à peine*      **kvazaŭ** = *comme si*

## Esperanto

## Français

Tiu filmo estis ridiga sed bedaŭrinde ne kredinda.  
 Lasu min gustumi tiun kukon, kiu tiel bonodoras.  
 Jes, sed nur pecon (da kuko) por plenumi vian deziron.  
 Mi esperas, ke vi poste plenumos viajn taskojn.  
 En Perigozo estas multaj vidindaĵoj kaj memorindaĵoj.  
 Paĉjo! Mi malfacile spiras. Malfermu la butonojn de via kolumo de ĉemizo. Kial vi ĉiujn butonumis?  
 Panjo timis, ke mi malvarmumos pro la malvarmo.  
 Anjo! Anstataŭ ludi, vi devus studi... Vi apenaŭ laboris.  
 Ĉu vi parolas la anglan (lingvon)? Apenaŭ...  
 Se Peĉjo ne semos, Petro ne rikoltos.  
 Multe komencite, malmulte plenumite.  
 Falinta floro ne revenos al la branĉo.  
 Vi timigis min, frapante al la pordo kvazaŭ vi estus fremdulo.  
 Vi aspektas pli june (, kvazaŭ vi estus pli juna).  
 Li estas ebria; li apenaŭ povas paŝi...  
 Venontan semajnon mi ferios. Alenjo anstataŭos min.  
 La estro anstataŭigis unu el siaj oficistoj (per alia).  
 Ĉu vi konas la fabelon « La sep kapridoj »?  
 Jes! Mi memoras, ke la lupo vokis la kapridojn imitante ilian patrinon. Poste ĝi uzis farunon por aspekti tiel blanke, kiel la kaprino. Kaj por savi siajn idojn, la patrino distranĉis la ventron de la lupo, kiu manĝis ilin. Nekredinde!

*Ceux-là ne passeront pas leurs vacances ensemble, aimait dire Thierry. Tout-à-fait Thierry, ajoutait Jean-Michel. Laurent Blanc remplace Karim Benzema par Olivier Giroux. Mais Florent Malouda est-il prêt à remplacer Frank Ribéry? Il doit auparavant s'échauffer (trotter ?). La semaine dernière (passée), je prenais le soleil en Espagne. Ce pays vaut le coup d'être visité, n'est-ce pas ? Malheureusement, par la suite, le temps s'est gâté. Papa et maman ont à peine vu le soleil. Ils ont regretté... Tu as l'air d'être en colère. Pourquoi t'es-tu mis en colère ? Parce que je n'arrive pas à boutonner ma chemise. Veux-tu une part (un morceau) de gâteau ? Oui, merci. De rien. M... ! Mon morceau est tombé par terre. Tu ne peux semer du gâteau ! Tu n'en récolteras pas ! Je plaisante... Ne plaisante pas trop ! Sinon je vais me mettre en colère ! Si vous avez besoin de moi, n'hésitez pas à m'appeler. Tchao !*

- **trans** = *au-delà de (en franchissant)*      **preter** = *au-delà de (en dépassant, en longeant)*
- **ekster** = *à l'extérieur de*      **laŭ** = *selon, en fonction de*      laŭ mi, vi parolas esperanton tre bone
- **ĵus** = *juste avant*      li ĵus alvenis = *il vient d'arriver*      mi ĵus eksciis tion = *je viens de l'apprendre*
- **tuj** = *tout de suite après*      li tuj alvenos = *il arrive(ra) tout de suite*      faru tion, tuj! = *fais-le, tout de suite !*

## Esperanto

## Français

Nevole la knabo ĵetis la pilkon trans la barilon. Sed tuj poste li feliĉe trovis truon tra la barilo kaj povis trapasi la barilon por reekhavi sian pilkon.

Estas ponto super la rivero. Ni do povos transiri la riveron kaj promeni sur la transan bordon.

Estas vojo preter la rivero.

Estas grave atenti, kiam vi preterpasas biciklantojn.

Georgo rakontas, ke la preterpasantoj rigardas la geamantojn, kiuj kisas unu la alian sur sia verda benko.

Li estas ekster nia domo: li ĵus alvenis.

Por malfermi la pordon, puŝu la prenilon. Ne! Tiru!

Permesu, sinjorino, ke mi prezentas min: mi nomiĝas...

Bonvolu paroli pli laŭte kaj malrapide: mi ne bone aŭdas (komprenas) vin. Bonvolu sidiĝi, sinjoro.

Ĉu ĝenus vin, se mi fumus? Jes, pardonu min.

Dankon pro via akcepto en via bela domo. Ne dankinde.

Li atendas ĉe la aŭtobus-haltejo por iri al la kinejo.

Kiel vi veturis? Trajne, ĝis la stacidomo, per tramo poste.

Via urbo estas granda. Mi ne konas tiun kvartalon. Jes, ĝi estas proksimume (ĉirkaŭ, pli-malpli) kvin kilometrojn larĝa. Vi povus viziti ĝiajn vizitindaĵojn.

Ĉu vi ploris? Viaj okuloj estas malsekaj.

Kie estas la necesejo? Sur la unua etaĝo.

Ĉu mi surmetu jakon aŭ mantelon? Mi ne scias, kiel vesti min... Kaj mi, ĵupon aux robon?

Rapidu! Vi ankoraŭ ne surmetis vian pantalonon, ŝtrumpetojn, ŝuojn,... Kie estas mia mansako?

*Ne jetez pas des pierres de l'autre côté du mur. C'est trop dangereux. Vois-tu par le trou ? J'aimerais bien traverser ce mur. Sautez la barrière pour récupérer ton ballon !*

*Selon moi, ce film mérite d'être vu.*

*Ne laissez pas de côté votre dictionnaire : vous pourriez avoir besoin de lui. Tirez très fort cette corde (ŝnuro).*

*Voudriez-vous bien pousser mon véhicule ? Merci. De rien.*

*Veillez vous asseoir et commencer à manger. Bon appétit !*

*Il parle lentement mais malheureusement trop doucement.*

*Comment êtes-vous venu ? A pied ? Non, en voiture.*

*Ce quartier fait à peu près 2 kilomètres de long.*

*Cette serviette de bain est mouillée. Voilà ! Celle-ci est sèche.*

*Leurs vêtements sont dans l'armoire : vestes, pantalons, robes...*

*Vous avez atteint la fin de ce recueil d'exercices : félicitations !*

*J'espère que vous avez eu plaisir à découvrir et étudier l'espéranto. A bientôt !*